
# *Investita per la ordeno José Martí la prezidento de Vjetnamio*




**Subskribas Vjetnamio kaj Kubo kunlaborinstrumentojn**

Havano, sep 20 (RHK) La solidareco kaj amikeco inter Vjetnamio kaj Kubo estos eterne nedetrueblaj ", diris la vjetnama prezidento kaj membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de tiu lando, Nguyen Xuan Phuc, ricevinte la ordenon José Martí el la manoj de la  prezidento Miguel Díaz- Canel Bermúdez.

En la Palaco de la Revolucio, la vizitanto elstarigis la honoron kaj emocion ricevi la plej altan distingon donitan de la kuba ?tato, samtempe elstarigante la ligojn de solidareco kaj amikeco, kiuj kunigas la du partiojn, ?tatojn kaj popolojn.

La 2-an de decembro, 1960, li rememoris, Kubo fari?is la unua lando en la okcidenta hemisfero, kiu oficiale starigis diplomatiajn rilatojn kun la tiama Vjetnama Demokratia Respubliko.
Malgra? la granda geografia distanco, kiu apartigas Vjetnamion de la insulo, Nguyen Xuan Phuc substrekis la kamaradecon, solidarecon, reciprokan subtenon kaj proksiman duflankan kunlaboron.

Li citis la frazon de Fidel Castro: "Por Vjetnamio ni pretas doni e? nian propran sangon."

Nguyen Xuan Phuc asertis la volon for?i la ekzemplajn kaj travideblajn solidarajn ligojn, kiujn prezidento Ho Chi Minh, la gvidanto Fidel Castro kaj la generacioj de gvidantoj kaj popoloj de amba? landoj konstruis kaj kiuj estis pruvitaj tra la historio en la lastaj 60 jaroj.

En la ceremonio, en la Palaco de la Revolucio, a?toritatoj de amba? nacioj subskribis plurajn jurajn kunlaborinstrumentojn:

Agadplano por efektivigo de la meza limtempo ekonomia-duflanka tagordo por la periodo 2021-2025

.Memoranda interkonsento inter la Ministerioj pri Publika Sano de amba? landoj por kunlaboro en ?i tiu sektoro.

Kunlabora programo por la periodo 2022-2023 inter la ministerioj pri justico de amba? landoj.

Agadplano inter la Ministerio pri Nutra?a Industrio de Kubo kaj la Ministerio pri Agrikulturo kaj Kampara Disvolvi?o de Vjetnamio pri la plenumo de la projekto "Subteno por la disvolvi?o de akvokulturo en Kuba fazo 3. Plii?o de akvokultura produktado en Kubo".

Memorando de kompreno pri la plano pri kunlaboro pri cibersekureco inter la Ministerio pri Komunikado de Kubo kaj la Ministerio pri Informado kaj Komunikado de Vjetnamio.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/270859-investita-per-la-ordeno-jose-marti-la-prezidento-de-vjetnamio

**Radio Habana Cuba**